

La termino „itinernuligo” troviĝas ankaŭ ĉe nedefinita (do ne traktenda) nocio 05002. Teorie necesas la nocio „malaranĝo de itinero”, sed normalokaze oni malaranĝas itineron nur per aranĝo de alia itinero por sekva veturo.

Jen noto por specialistoj: Por ĉeflinioj la riglotekniko enhavas po du paŝojn de riglado kaj malriglado. En la germana faklingvo ekzistas diversaj terminoj por tio: unua paŝo de riglado = *Verschluss*, dua paŝo = *Festlegung*, unua paŝo de malriglado = *Auflösung*, dua paŝo = *Aufhebung des Verschlusses*. La ĝisnunaj *RailLexic*-difinoj ankoraŭ ne diferencigas tion. Sekve solvo de tiu problemo nun ne estas nia tasko, kvankam „antaŭriglado” kaj „finriglado” povas esti taŭgaj Esperanto-terminoj.

### Diskutoj kun ĉinaj kolegoj

En Ŝanhajo unuafoje eblos vasta diskutado kun ekstereŭropaj fak kolegoj. Tie ni certe spertos problemojn rezultantajn el alia disdivido de nociaj karakterizaĵoj, do el alie kombinitaj nociosistemoj. Pro tio mi jam donis al kolego *Han Zuwu* liston de bazaj transportfakaj terminoj, por prepari tiajn diskutojn:

fervojo, metroo, tramvojo, magnetvojo, vagono, vagonaro, trajno, manovri, ranĝi

**Karaj geamikoj**, mi petas pripensi solvojn de la respondendaj demandoj, kaj


- aŭ prepari sin por kongresaj fakaj kunsidoj
- aŭ (se vi ne partoprenos) informi min rete/skribe.

Resume la demandoj koncernas jenajn nociojn:

- en TeKu 126 sur paĝo 2: **01141-2**, paĝo 3: **02835-1**, paĝo 5: **11278**, paĝo 6: **12324**
- en ĉi tiu TeKu 127 sur paĝo 1: **02386** kaj **02562**, paĝo 2: **09217**, paĝo 3: **02910** kaj **09817**, paĝo 4: **03858**, paĝo 5: **01819**, **02641** kaj **00341**

Fine mi deziras al la kongresaj partoprenontoj tute sekurajn kaj sufiĉe agrablajn vojaĝojn al Ŝanhajo kaj ree hejmen.

Heinz Hoffmann



## Terminara Kuriero

TeKu 127

Aprilo 2006

### Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: IFEF.B90GR-mei@t-online.de

### Karaj geamikoj,

ĝustatempe antaŭ la kongreso en Ŝanhajo vi ricevu la aktualan laborrezulton de nia Terminara Sekcio. Intertempe alvenis pluraj kontribuoj al kreo aŭ elekto de sufiĉe taŭgaj terminoj.

Por nocio **02386** (TeKu 126, paĝoj 2/3) inĝ. *Zdeněk Polák* preferas la terminon „interesdeklaro pri damaĝkompenso”. Vigla diskutado pri tiu temo okazis kun d-ro *Zlatko Hinšt*. Li sendis al mi la tekston de Internacia Konvencio pri la Fervoja Vartrafiko (*CIM*), el kiu pli detale klariĝas la enhavo de nocioj 02386 kaj 04688. Laŭ tiu nova klariĝo mi nun anstataŭigas la du terminproponojn per jenaj tri:

#### 1) interesdeklaro pri la livero

#### 2) interesdeklaro pri laŭregula livero

#### 3) interesdeklaro pri sendamaĝa livero

Por la najbara nocio 04688 eblas egalaj tri proponoj, sed anstataŭ „interesdeklaro pri ...” tie ĝustas „intereso pri ...”.

La propono 1 respondas laŭvorte al nacilingvaj *CIM*-terminoj. La aldonaj adjektivoj en la proponoj 2 kaj 3 servu al pli bona kompreno, ĉar laŭ *CIM*-teksto temas pri livero sen dumtransportaj perdo, difektiĝo kaj malfriiĝo. *Zlatko Hinšt* preferas la proponon 1, do laŭvortan termintradukon.

Por nocio **02562** (TeKu 126, paĝo 3) *Zdeněk Polák* proponas novan solvon „veturildeponejo”, ĉar „hejmo” ne estas ligita kun senvivaj objektoj. Jen la koncernaj PIV-klarigoj:

- deponi 1** Lasi ĉe iu valorajon gardotan.  
**hejmo 1** Propra aparta domo aŭ loĝejo, kie oni vivas konstante.  
**hejmo 2** Loko destinita servi kvazaŭ hejmo por aparta kategorio de personoj.

Klaras ke uzo de „hejmo” por veturiloj estas metafora. Sekve nun estas du proponoj:

#### 1) veturilhejmo

#### 2) veturildeponejo



Por nocio **02835-1** (TeKu 126, paĝo 3) *Zdeněk Polák* preferas la terminon „bremsadistanco”. La duobla nocio 02835 restu en diskutado.

Pri nocio **08346** (TeKu 126, paĝo 4) alvenis konsenta kontribuo. Sekve mi deklaras la terminon „posedanto de suborda fervojinstalaĵo” decidita.

Koncerne noción **08376** (TeKu 126, paĝo 4) el pli profunda esploro klariĝas, ke *UIC* erare alligis la difinon. Vere ĝi apartenas al nocio **02967** kun jenaj nacilingvaj terminoj:

ĉeĥa	<i>doba stání (nákladní vůz)</i>
dana	<i>standtid (godsvogne)</i>
germana	<i>Standzeit (Güterwagen)</i>
franca	<i>durée de stationnement (wagon)</i>
hungara	<i>állásidő</i>
itala	<i>sosta (carri)</i>
pola	<i>czas postoju (wagon towarowy)</i>
rumana	<i>durată de staționare (vagon marță)</i>
serba	<i>vreme stanjanja (kola)</i>
Esperanto	restadotempo (varvagono)

Al mia dua terminpropono alvenis konsenta kontribuo. Sekve mi deklaras la solvon „**vagonrestado pro kargadmalfriĝo**” decidita.

Koncerno noción **08565** (TeKu 126, paĝoj 4/5) ni atendu respondon de la leksikologo prof. d-ro *Erich-Dieter Krause*. Li konstante legas Terminaran Kurieron kaj afable promesis pripensi taŭgan solvon. En lia ellaborata granda vortaro Germana – Esperanto ankaŭ estos listigataj la nocioj 08565 (*Böschung*) kaj 07496 (*Bahndamm*).

Por nocio **09217** (TeKu 126, paĝo 5) *Zdeněk Polák* proponas novan solvon, nome nur la parentezon de solvo 3 kiel terminon. Sekve nun estas kvar proponoj:

- 1) **vojkonstruo subtera laŭ berlina metodo**
- 2) **konstrumetodo berlina (subtera trafikvojo)**
- 3) **tranĉeado kovrita (tunelkonstruo laŭ Berlina metodo)**
- 4) **tunelkonstruo laŭ Berlina metodo**

Por nocio **11278** (TeKu 126, paĝo 5) *Zdeněk Polák* preferas (laŭ sia elekto pri 02835-1) la terminon „bremsadistanco absoluta”. La nocio restu en diskutado.

Inĝ. Ludoviko Sekereš denove pripensis noción **00587** (TeKu 124, paĝo 3). Sekve de analizo de la origina franca difinteksto li proponas pro la franca difinvorto „*autorisation*” novan terminon „rajtigo por loka regado” anstataŭ la jam deciditan solvon „liberigo por surloka funkciigo” (TeKu 125, paĝo 2). *Zlatko Hinš* subtenas tiun solvon. Mi deklaras la terminon „**rajtigo por loka regado**” nove decidita.

Por nocioj **01141-2** (TeKu 126, paĝo 2) kaj **12324** (TeKu 126, paĝo 6) ne alvenis kontribuoj. Sekve ambaŭ nocioj restu en diskutado.

**01819** Aranĝo de trajnitinero en regejo, impulsata de komputilo reganta trajnveturojn.

ĉeĥa	<i>řízení jízdní cesty</i>	itala	<i>manovra degli itinerari</i>
dana	<i>automatisk togvejsindstilling</i>	pola	<i>nastawianie dróg przebiegu</i>
germana	<i>Fahrstraßensteuerung</i>	rumana	<i>comandă a parcursului</i>
franca	<i>commande des itinéraires</i>	serba	<i>postavljanje puta vožnje</i>
hungara	<i>vágányútbeállítás</i>	Esperanto	itinerstarigo

Terminproponoj:

- 1) **itineraranĝo komputile impulsata**
- 2) **itinerformado komputile impulsata**
- 3) **itinerstarigo komputile impulsata**

Ambaŭ ĉi tieaj nocioj 03858 kaj 01819 koncernas procedon antaŭ itinerriglado (03230). Pri la procedo post la sekurigita veturo temas jenaj traktendaj nocioj:

**02641** Procedo post veturo, dum kiu riglita itinero aŭtomate aŭ permane estas malriglata.

ĉeĥa	<i>uvolnění vlakové cesty</i>	itala	<i>soppressione di un itinerario</i>
dana	<i>togvejsopløsning</i>	pola	<i>zwolnienie drogi przebiegu</i>
germana	<i>Auflösen der Fahrstraße</i>	rumana	<i>anularea unui parcurs</i>
franca	<i>destruction d'un itinéraire</i>	serba	<i>poništavanje puta vožnje</i>
hungara	<i>vágányútfeloldás</i>	Esperanto	itinernuligo

Nota: El la PIV-klarigo

**nuligo** Deklaro, ke io ne validas.

evidentas, ke la ĝisnuna termino ne taŭgas. Vere temas pri malriglado.

Terminproponoj:

- 1) **itinermalriglado**
- 2) **malriglado de itinero**; itinero [malriglado de -]

**00341** Malriglado de minimume unu itinerasekcio perkompuitile riglita por trajnveturo, cele al sekva itineraranĝo.

ĉeĥa	<i>zrušení vlakové cesty</i>	itala	<i>cancellazione dell'itinerario</i>
dana	<i>togvejsopløsning</i>	pola	<i>anulowanie drogi przebiegu</i>
germana	<i>Fahrstraßenauflösung</i>	rumana	<i>anulare de itinerar</i>
franca	<i>annulation d'un itinéraire</i>	serba	<i>opoziv puta vožnje</i>
hungara	<i>vágányút feloldás</i>	Esperanto	itinernuligo

Terminproponoj:

- 1) **itinermalriglado perkompuitila**
- 2) **perkompuitila malriglado de itinero**; itinero [perkompuitila malriglado de -]

### Jen kelkaj novaj diskutindaj problemoj:

- La neologismo „leno“ ne troviĝas en PIV, sed en la grandaj vortaroj Esperanto – Germana – Esperanto de *Erich-Dieter Krause* ĝi estas trafikfaka traduko de la germana termino „*Fahrspur*“. Temas pri tia veturvojo aŭ veturvojparto, kia laŭ sia konstrukcio aŭ limigita larĝo ne ebligas iron de pluraj apudaj veturiloj. Sekve sur ĝi eblas samtempaj veturoj en nur unu direkto. La nocio estas ĝeneraltrafika. Ĝia ŝosea varianto nomiĝas laŭ PIV „koridoro“ (3). Ĉe fervojo, tramvojo ktp ĉiu unuopa trako estas speco de leno. Aliaj variantoj ekzistas ĉe magnetvojo, ĉe unurelaj transportsistemoj kaj en flughavenoj. Kvankam mi principe strebas al evito de ne-PIV-aj radikoj, mia opinio ni akceptu ĉi tiun neologismon, ĉar vere necesas tiu superordita nocio. En *RailLexic* troviĝas du koncernaj difinitaj nocioj:

**02910** Speco de veturvojo, ebliganta samtempe ambaŭdirektajn veturojn sur la liniosekcio.

ĉeĥa	<i>dvoukolejná trať</i>	itala	<i>doppio binario</i>
dana	<i>dobbeltspor</i>	pola	<i>linia dwutorowa</i>
germana	<i>Doppelspurfahrweg</i>	rumana	<i>cale dublă</i>
franca	<i>double voie</i>	serba	<i>dvokolosečna pruga</i>
hungara	<i>kétvágányú pálya</i>	Esperanto	linio dutraka

Terminproponoj:

**1) veturvojo duope lena**

**2) veturvojo pare lena**

Noto: La termino „fervojlinio dutraka“ troviĝas ĉe nedifinita nocio 05041.

**09817** Speco de veturvojo, sur kiu la trafiko en ambaŭ direktoj devas uzi la saman lenon.


ĉeĥa	<i>jednokolejná trať</i>
dana	<i>enkeltspor</i>
germana	<i>Einspurfahrweg</i>
franca	<i>simple voie</i>
hungara	<i>egy nyomvonalú pálya</i>
itala	<i>semplice binario</i>
pola	<i>linia jednotorowa</i>
rumana	<i>linie simplă</i>
serba	<i>jednokolosečna pruga</i>
Esperanto	linio unutraka

Terminpropono :

**veturvojo unulena**

Noto: La termino „fervojlinio unutraka“ troviĝas ĉe nedifinita nocio 05098.

Ĉu vi kontentas pri tiuj solvoj?



unulena veturvojo de japana magnetvojo

- La fervojfaka nocio „**itinerio 3**” troviĝas en PIV post „itinerio 1” (ĝeneraluza) kaj „itinerio 2” (geodezio kaj topografio). Ĝi havas jenan difinon:

Sinsekvo de trakoj kaj trakforkoj en stacio aŭ disforkejo, por regulaj trajnaj aŭ manovraj veturoj.

En *RailLexic* la koncerna nocio 09734 (ankoraŭ malĝuste „veturvojo”) estas iomete alivorte difinita per:

Vojo konsistanta el trakoj kaj trakforkoj, por veturado de surtrakaj veturiloj, ĝenerale limigita per signaliloj.

Jen kelkaj traktendaj nocioj pri agoj rilate al itineroj:

**03858** Pozicioĝustigo de inversigeblaj elementoj de itinero, kaj ties rezervado por trajna aŭ manovra veturo.

ĉeĥa	<i>postavení jízdní cesty</i>
dana	<i>togvejsindstilling</i>
germana	<i>Fahrstraßenbildung</i>
franca	<i>formation d'un itinéraire</i>
hungara	<i>vágányútképzés</i>
itala	<i>formazione di un itinerario</i>
pola	<i>układanie drogi przebiegu</i>
rumana	<i>realizarea unui parcurs</i>
serba	<i>formiranje puta vožnje</i>
Esperanto	itinerformado

Noto: La nedifinita nocio 00238 havas la terminon „aranĝi itineron por trajno”. La sekva nocio 01819 sur paĝo 5 nomiĝas „itinerstarigo”. Cele al unueco ni decidu, ĉu oni „aranĝas” aŭ „formas” aŭ „starigas” itinerojn. Jen la PIV-klarigoj:

**aranĝi 1** Meti laŭ ĝusta ordo, en taŭgan pozicion.

**formo 1** Sensebla aspekto, kiun objekto prezentas ekstere.

**starigi 4** Estigi, establi, fondi.

Terminproponoj:

- 1) **itineraranĝo**
- 2) **itinerformado**
- 3) **itinerstarigo**

